



# ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO-LIGO EN ISRAELO

Tel Avivo 61390,  
Poŝtkesto 39004

N-ro 58. Septembro 1976



ה א ס פ ר נ ס י ט ס ה ל י א ל י

בטאון הליגה לאמפרנטו בישראל

תל-אביב - 61390  
ת.ד. 39004

חוברה 58 -- ספטמבר 1976


העורך : אלכסנדר סגור

E N H A V O

	paĝo
Saluttelegramo de la Israela Prezidento	1.
La 61-a UK de Esperanto	2.
Operacio Entebe	3.
Int. Labortendaro en kibuco	4.
Novaj junaj fortoj en Israelo	6.
49-a kongreso de SAT	8.
Al Germanoj (trad. I. Missiuro)	9.
La minoritatoj en mezoriento	11.
Kadiŝo (trad. E. Schlesinger)	12.
Impresoj de vizito en USONO	14.
Omaĝe al Jerusalemo (trad. J. Kohen Cedek)	16.
	17.
	19.
	21.
	22.

ANGULO DE JELI

IJK en Tesaloniko	17.
El la esperanta gazetaro	19.
Ni funebras	21.
El nia agado kaj movado	22.



# ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO-LIGO  
EN ISRAELO

Tel Avivo 61390,  
Poŝtkesto 39004  
N-ro 58. Septembro 1976.

Ĉefredaktoro:

Aleksander Manor

en la redakta komitato:

Josef Ŝemer

FELIĈAN NOVAN JARON

La Estraro de ELI JELI kaj la redakcio de Israela Esperantisto deziras al ĉiuj israelaj kaj eksterlandaj samideanoj FELIĈAN KAJ PACAN NOVAN JARON.



SALUTTELEGRAMO

de la Israela ŝtatprezidento prof. d-ro E. KACIR  
al la Universala Kongreso de Esperanto en Ateno.

(Traduko) Sentante veran proksimecon al la forta pac-  
aspiro, kiu celas alproksimigi komprenigon per la inter-  
nacia lingvo, kiu instigis d-ron L. Zamenhof krei la lin-  
gvon Esperanto antaŭ 90 jaroj, - mi ĝojas sendi al via  
1976-jara Kongreso miajn plej sincerajn gratulojn kaj  
bondezirojn de la Israela Popolo por sukceso en via la-  
boro kaj progreso al la nobla celo de la homa interkom-  
prenigo.

LA 61-a UNIVERSALA KONGRESO - ne amasa sed memorinda.

La UK okazis ĉi jare en Ateno tuj post la Internacia Junulara Kongreso. Kompare kun pasintaj UK la nombro de ĉeestantoj estis malgranda. Sed por ni -la Israela Esperanto-movado-ĝi estis historia kongreso. Partoprenis ĝin 23 samideanoj, rekorda nombro de post la jaro 1954. Nia malgranda ŝtato reliefigis dum la solena Inaŭguro, kiam la konsilanto de la loka Israela ambasado salutis esperantlingve la partoprenantojn en la nomo de la Israela registaro. Krom tio oni tra legis la saluttelegramon de nia Ŝtatrezidento E. Kacir. Dum la poste sekvinta Malfermo de la Kongreso salutis la kongresanaron en la nomo de ELI nia merito-plena s-ano J. Kohen-Cedek.

Ĝenerale oni povis trovi niajn samideanojn ĉe la plimulto de la diversaj kongreseroj, ek de la komitatkunsidoj ĝis la varitemaj ISU (Internacia Somera Universitato)-prelegoj.

Grava kaj interesa estis ĉi jare la podia diskuto, kies temo estis "kiel nuntempe argumenti por Esperanto?" -ĉar la saĝaj kaj ĝustaj argumentoj por konvinki la neesperantistojn pri la bezono kaj avantaĝoj de la Internacia Lingvo ne ĉiam estas disponeblaj al granda parto de niaj samideanoj, ĝuste pro tio lernendaj estas la konkludoj de tiu ĉi podia diskuto. Evidentiĝas, ke multaj el ni simple forigas potencialajn lernantojn de Esperanto per malbona argumentado por nia lingvo. Ni esperu do, ke ni ĉiuj profitos de tiu ĉi grava kongresa ero, kiam ĝiaj ĉefaj punktoj aperos en la internacia gazetaro, kiel estis promesite en Ateno.

Argumenti tamen por Esperanto al la simpatiaj Grekoj estis preskaŭ absolute neeble por ni pro... la lingva barilo. Evidentiĝis, ke kun la Grekoj, kiujn ni rekontis en la aŭtobuso, restoracie aŭ simple surstrate, ne eblis kontakti, ĉar ili scipovas uzi nur sian propran lingvon... Tiu ĉi fakto malhelpis al la esp. turistoj kaj ankaŭ mirigis ilin, ĉar ĝenerale multaj anoj de la Verda Popolo parolas almenaŭ du fremdajn lingvojn... Niaj oftaj kapdolorigaj erarvagadoj en Ateno pruvis al ni denove la urĝan bezonon de la internacia lingva komunikilo.

Nia ĉefa malamiko en Ateno estis la distanco inter la diversaj studentaj domoj aŭ hoteloj kaj la Kongresa domo. Tiakaŭze oni preferis ĉiam kvarope taksiveturiri (kia lukso!) al kaj el la kongresejo. La prezo de la taksioj estis malalta kompare al la kosto de niaj taksioj.

La agrablan konatiĝon kun la Helena folkloro ni havis en kadro de la subĉiele okazinta Greka Vespero: aro da kantistoj kaj dancistoj prezentis varian kaj sukcesan programon kaj ricevis de lakongresanoj multe da aplaŭdoj.

Iom malsukcesa estis la bulgara teatraĵo "Lernejo de Virinoj" de Molière, ĉar ne ĉiuj en la salonego sukcesis kompreni la aktorojn-aŭ pro neklara prononcado aŭ pro la nesufiĉa voĉlaŭteco.

La diversaj ekskursoj kondukis la partoprenantojn al fascinaj lokoj, kiel al la fama sanktejo Delfo, aŭ al la blankdomaj insuloj de la Sarena Golfo.

Resume oni povas diri, ke la 61-a UK estis memorinda evento, pro tio, ke por la plimulto de ni -la Israelanoj- ĝi estis la unua (kaj espereble ne la lasta) UK.

Antaŭ la fino mi permesas al mi averti la legantojn: se vi intencas viziti ĉarman Grekujon, ekstudu antaŭe la grekan alfabeton, ĉar vi vane serĉos en la urbo de Palado-Minervo latinliterajn stratnomojn!

J. Semer



#### OPERACIO "UGANDO - ENTEBE"

Post la surteriĝo de israelaj soldatoj en Entebe kaj liberigo de la garantiuloj ELI ricevis multajn leterojn de la tuta mondo. Pro la abundo de ili ni ne scipovas ĉiujn citi, eĉ se ili venis de elstaraj personoj kaj de organizaĵoj, sed ni citos nur unu leteron, kiu venis sen subskribo, kun poŝtmarkoj de Danlando. La teksto klarigos mem al la legantoj, kial la verkinto ne subskribis la leteron.

"Estimata... Per ĉirkaŭira vojo mi sendas je Viaj manoj esprimojn de la plej granda admiro kaj respekto pro la brilanta heroaĵo de israelaj komandosoj sur la aerodromo Kampala por la tuta Israela Nacio.

Multaj Poloj sincere gratulas Vin pro la ekstraordinara sukceso kaj vere ĝojas pro tiu fulmrapida kuraĝega ago. Al ni-Poloj, via laŭdinda ago rememorigas la plej belajn kartojn de la polaj bataloj kontraŭ malamikoj.

Se ĉiuj nacioj tiel brave kontraŭbatalus la aviadilantbanditismon, certe la homoj povus jam sekure vojaĝi.

Mi restas plena da alta respekto pro la braveco de la Israela Nacio.

Via pola amiko "

ĈIO KION VI VOLAS SCII PRI INTERNACIA  
LABORTENDARO EN KIBUCO

La ideo organizi internacian labortendaron naskiĝis, kiam mi estis eksterlande. Multaj samideanoj demandis min senĉese pri la vivo en kibuco kaj multaj esprimis la deziron viziti kibucan, kiu estas la unika socia kadro en la mondo, kie oni plenumas la ideojn de socialismo. Kiam mi menciis la ideon de labortendaro, multaj amikoj certigis sian partoprenon.

Do, revenante Israelon mi serĉis kibucan, kie loĝas samideano. Mi tuj ricevis la gajplenan pozitivan respondon de s-ano Cvi Solt de kibuco Gaaton. Kiam mi venis priparoli la aferon kun la sekretario restis du problemoj: la loko estis tro fora de la centro de la lando, kaj: la kibuco ne konsentas ricevi laborantojn pli junajn ol 18-jaraj.

Kiam ni diskutis la aferon inter ni, en JELI, ni decidis tamen pri Gaaton, malgraŭ la iomete fora loko, sed pli interesa kaj taŭga por ekskursoj ol en la centro.

Ni anoncis la aferon en Heroldo kaj Esperanto kaj sendis informilojn al ĉiuj sekcioj de TEJO. Mirigis min la malforta reago. Kie estas ĉiuj, kiuj juris veni al la labortendaro? Kelkajn mi demandis letere kaj ili apologiis kaj klarigis, ke en iliaj mapoj ne aperas kibuco Gaaton; sed ili scias, laŭ la informilo, ke ĝi estas proksime de Naharia; kaj la "a" de la nomo Naharia estas proksime de Bejrut kaj tie ja estas la milito...

Ankaŭ multaj JELianoj ne povis partopreni. Multaj veturis al la Kongresoj en Grekio. Ilia tempo estis limigita kaj ne povis ĝui ambaŭ okazaĵojn.

Aliĝis 7 eksterlandanoj kaj 20 israelanoj sed venis nur 4 eksterlandanoj kaj 16 israelanoj. Do oni povas diri, ke estis intima atmosfero...

Por mi la inaŭguro okazis en la flughaveno "Ben Gurion" ĉe la blonda ĉarma fraŭlino de la informejo. Mi diris, ke mi atendas aliĝinton de Japanio, kiu parolas japane kaj esperante. Do, ĉar niaj scioj pri la japana lingvo ne estas tro vastaj restas nur alternativo voki lin esperante. Unue ŝi ridis pensante, ke mi ŝercas. Kiam mi konvinkis ŝin, ke vere esperanto estas uzata, ŝi serioziĝis kaj diris, ke mi ne rajtas uzi la laŭparolilon. Do mi konvinkis ŝin, ke ŝi povas tuj lerni la frazon. Kiam ŝi bone prononcis ĝin ŝi estis fiera. Ŝi atentigis ĉiujn kunlaborantinojn kaj fiere anoncis: "sinjoro Obata Jasunobu, bonvolu kontakti la ĉefinformejon, dankon." Ŝajnas, ke estas unua fojo en la historio de la nacia flughaveno, ke la internacia lingvo estis aŭdigita publike.

La fraŭlino estis tre kontenta kaj ĝis kiam la gasto finis la enirformalaĵojn mi iomete instruis ŝin la lingvon. Morgaŭe, kiam mi atendis alian samideanon, ŝi vokis min: "si-

ni ĵoro Esperanto, ĉu mi anoncu denove?" kaj ŝi ripetis la frazon por la venonta gasto. Mi volus instrui ŝin private, sed verŝajne mia edzino ne konsentus...

La unua vespero estis libera. Ne formala interkona vespero. Kelkaj alvenis nur post noktomezo, do dum la morgaŭa tago oni ne laboris. Ĝenerale oni laboris en la pirujĝardeno je la kvara kaj duono matene ĝis la deknua. Oni rikoltis pirojn, laŭ la mezkalkuloj 500 kg tage "po kapo". Mi volas konfesi, ke mi timis pri la laborpovo de la plenaĝuloj, sed diri la veron, S-anoj Giladi kaj Braña rikoltis pli lerte ol la junuloj!

La dua parto de la tago estis dediĉita al kultura agado, ekskursoj, naĝado en la bela naĝejo de la kibuco, konatiĝo kun la kibuco kaj kibucanoj kaj ripozo. Ankaŭ la vesperoj estis programitaj.

La ekskursoj kaj vizitoj ekster la kibuco estis relative multaj. En la muzeo de "Batalantoj de la Gettoj" en kibuco Loĥamej Hageaot ni eĉ vidis filmon pri ekstermado de la Judoj dum la lasta mondmilito. En Roŝ-Hanikra ni ĝis la kablano vagonon kaj la belegajn kavojn en la monto. Al la najbara kibuco Jeŝiam ni piede promenis, vizitis la fortikaĵon de la krucista epoko kaj aŭdis interesajn rakontojn pri la historio de la kibuco antaŭ kaj dum la sendependiga milito. En kibuco Evron gastigis nin s-anino Meri Ofer; ni promenis en la kibuco kaj aŭdis prelegojn pri la historio de tiu loko ekde la pratempoj.

Sabate ni havis tuttagan ekskurson -laŭlonge de t.n. "bona barilo" kun Libano, Alta Galileo, Cefat- fortikaĵo kaj artista kvartalo, Kineret (Galilea Lago), kie ni gastigis ĉe s-ano Levenkopf en kibuco Maagan kaj tie ĝis la akvon de la lago. Alia ekskurso estis al fabriko "Miluot", kie oni pakas la rikoltitajn fruktojn. En Hajfo ni vizitis artistan araban familion (Kfar-Samir), kie ni rigardis la produktproceson de diversaj ceramikaĵoj; poste ni traveturis la suban urbon, Vadion Bejt-Oren, Belvidejon David Izan sur la monto Karmelo, centron de Karmelo kaj Hadar Hakarmel.

En la programo estis diskutoj pri la kibuco kiel socia kaj ekonomia kadro; svisaj belaj folkorkantoj aŭdigitaĵoj de s-anino Nelly Ackerman, kiu aperis vestita en la nacia kostumo, kaj interesa prezentado de lumbildoj pri Japanio, farita de s-ano Obata Jasunobu. En alia vespero ni lernis israelajn folkordancojn per la helpo de s-anino Meri Ofer kiu estas dancistino de la regiona dancgrupo. Ni vizitis ankaŭ la artiston Ŝmuel Katz, kibucanon de Gaaton, en lia laborĉambro (La artisto eĉ preparis la kovrilpaĝon de la esperanta broŝuro, kiun ni eldonis antaŭ la fino). Dufoje ni renkontis "verdajn" grupojn: la Nordan Grupon de ELI kaj la junajn esperantistojn de JELI. Plej interesa estis la nokta veturo al Tiberio, kie ni ĝis la artan vesperon dank' al la dancgrupo de la kibucoj kaj poste ni gustumis la akvon de Kineret noktmeze, naĝante sub la luna lumo.

Grava atingo por ni estis du kursoj de E-o, kiuj okazis dum la labortendaro. La unuan por infanoj gvidis s-ano Giladi kaj partoprenis ĝin 10 infanoj. Li komencis la kurson kaj s-ano Cvi Ŝolt daŭrigos ĝin. La alia estis por plenaĝuloj, kiujn mi gvidis, kaj finis ĝin 16 lernantoj. Mi vere admiras la lerneblecon de la kibucanoj. Ili lernis tri foje semajne, dum du semajnoj, ĉiam dum unu horo kaj ĉiam ricevis demandojn por respondi. Ili daŭre lernis tre koncentrite, malgraŭ la fakto, ke ĝi okazis paralele al la televidaj programoj pri la Olimpikoj. Laŭ la letero, sendita poste al mi, oni povas konstati tre altan nivelon post la kurso kaj ni esperu, ke Cvi daŭrigos la kurson en Kibuco Gaaton.

Oni diras ke "La piristo ne atestas pri siaj piroj". do mi ne volas ĵuĝi la sukceson de la labortendaro, sed mi certe ĝuis ĝin kaj estis kontenta. Mi nur esperas, ke per la helpo de aliaj s-anoj ĝi fariĝos tradicio kaj ni organizos ĉiujare labortendaron en kibuco. Tiam ankaŭ la kvallito pliboniĝos de jaro al jaro.

Moŝe Ben - Porat



#### NOVAJ JUNAJ FORTOJ EN ISRAELO

Esperanto-movado en Israelo dum multaj jaroj batalis kontraŭ pasiveco de la israela junularo rilate la internan lingvon. Evidentiĝis, ke multaj maljunaj adeptoj de esperanto pro sia ne juna aĝo ne trovis komunan lingvon kun la nova generacio. Vere la distanco estis pli granda; ne unu generacio, sed du generacioj mankis. Multaj novaj sed maljunaj samideanoj malgraŭ sia fervoro ne scipovis instigi junularon fariĝi aktiva.

En la lastaj jaroj la afero ŝanĝiĝis. Tute subite la juna generacio, kiu pasivis tiel longe, vekigis kaj scipovis aldoni fermenton al nia movado. La unua estis s-ano Anat Zduńska-Zajdman, kiu eldonis korespondan lernolibron kaj kelkajn jarojn gvidis la korespondan kurson. Tiu kurso scipovis atingi homojn, kiuj pro la distanco de Tel Aviv ne povis ĝui la tel-avivajn kursojn. Jam post mallonga tempo aperis novaj adeptoj de nia lingvo en diversaj lokoj ekster Tel Aviv. Anat eldonis ankaŭ kantareton kaj partoprenis, kiel la unua israelano, la kongreson de TEJO en Pollando. Baldaŭ poste studento Josi Ŝemer forprenis de ŝi la gvidadon de la kurso, kiam ŝi pro la nasko de filo devis

tempe forlasi aktivan agadon. Josi Ŝemer prenis al si ankaŭ grandan kaj malfacilan laboron de la administracio de ELI, TEJO kaj de Israela Esperantisto. Li ankaŭ scipovis komenci organizi la junularan grupon. Malnova kaj juna samideano Moŝe Ben Porat gvidas ankaŭ kursojn kaj scipovis tre sukcese organizi internacian labortendaron en Kibuco Gaaton. La tendaro sukcesis de ĉiuj aspektoj. Ne nur donis senpagan tre interesan amuztempon por samideanoj, sed ankaŭ influis multajn kibucanojn lerni esperanton. Oni povas esperi, ke la tendaro fariĝos ĉiujara entrepreno, kiu donos instigon al la komencantoj perfektigi la lingvokonon.

J. Tileman scipovis aktivigi la Noraan Grupon de Israelo, kiu post la morto de aktivuloj kaj forlaso de Hajfo de I. Israeli ĉesis esti aktiva.

A. Wandel scipovis per sia obstineco paroligi esperante sian tutan familion. Li sole scipovis organizi kun rabato amasan (laŭ israelaj eblecoj) vizitadon de la kongresoj de TEJO kaj UEA en Ateno. Li per sia humuro scipovis instigi la gejunulojn partopreni junularajn kunvenojn, kiuj apartiĝis de la klubaj vesperoj. Oni devas menciigi, ke li lernis mem la lingvon en specialaj kondiĉoj - estinte soldato dum la lasta milito (1973); kiam li revenis de la fronto li parolis jam sufiĉe bone la lingvon.

Oni devas substreki, ke ĉiuj menciitaj junuloj regas bone la lingvon kaj Josi S. eĉ fariĝis korektanto de Israela Esperantisto.

Gejunuloj scipovis ankaŭ trovi la vojon al radio kaj la televido, kaj ilia apero (Wandel, Ŝemer kaj Zajdman) donis fortan antaŭenpuŝon al nia movado.

La Junularo renkontiĝas ĉiumonate en alia loko en la tuta lando. Ĉiam alia junulo invitas la tutan grupon. En lasta tempo la grupo fariĝis tiel multnombra, ke oni komencis serĉi konstantan salonon por la renkontiĝoj.

La kunvenoj de la junularo havas tute alian karakteron ol la klubaj vesperoj de ELI (Esperanto-Ligo en Israelo). La kunvenoj de JELI (Junulara ELI): Anstataŭ aŭdi prelegojn aŭ diskuti, JELI preferas amuzon, kantojn, patefondiskojn, piknikojn, dancojn, lingvajn ludojn kaj enigmojn, komunajn marŝojn kaj ekskursojn. La junaj metodoj evidentiĝis esti pli efikaj kaj altirantaj ol la malnovaj.

Oni devas ankaŭ substreki novajn ideojn por la propagando kaj informo. Amri Wandel organizis standon ĉe la studenta foiro kaj kiam la studenta organizaĵo postulis pagon por la stando ELI donis 10 senpagajn lokojn ĉe la proksima kurso de esperanto... Li sukcese ankaŭ organizis marŝon tra la stratoj de Tel Aviv kun esp. flago.

Oni devas aldoni, ke multaj aliaj junuloj estas pli aŭ malpli aktivaj. Menciitaj estis nur la elstaraj. Estas ekzemple inter la junularo 2 radioamatoroj, kiuj estas en kontakto kun samideanoj tra la tuta mondo. Inter ili jam troviĝas 16-jara knabo, kiu ĵus finis la kurson kaj parolas bone la lingvon.

Grave estas ke JELI, malgraŭ aparta statuto kaj aparta organizaĵo, ne konkuras, sed kunlaboras kun ELI, aldonante novajn fortojn al ĝi post la forpaso kaj malsaniĝo de kelkaj maljunuloj.

H.M.

#### 49-a KONGRESO DE S A T EN SVEDIO

La 49-a Kongreso de SAT okazis en la bela urbo Gotenburgo en Svedio, en la fino de Julio 1976.

Kiel kongresejo servis la universitato de Gotenburgo; tie okazis ĉiuj aranĝoj de la Kongreso. Partoprenis ĝin 320 kongresanoj de 18 diversaj landoj (2 israelanoj).

La interkonatiga vespero, kiu okazis en restoracio, estis gaja. Oni ĝuis la kafon, kukojn, muzikon, dancadon kaj fine oni montris filmon.

Dum la solena malfermo salutis la kongreson diversaj esperanto-organizaĵoj, sindikatoj kaj asocioj. En la nomo de ELI salutis la Kongreson H. Haroun. Liaj salutvortoj estis akceptitaj per longa kaj forta aplaŭdo, kiu atestis pri la simpatio de partoprenantoj al nia lando.

Interese prelegis, inter aliaj, Fustin Minumi pri Burundio en Afriko kaj montris lumbildojn. Petro Levi, prezidanto de SAT, prelegis pri "La Borso, ĝia funkcio kiel financpumpilo". S. Aarse pri "Lingvo kaj realo".

La distra parto vekis la entuziasmon de ĉiuj. Substrekindaj estas i.a. la teatra vespero, folkloro programo, popoldancoj kaj pupteatro.

La tuttaga kongresa ekskurso gvidis ŝipe al la dana urbo Frederikshavn kaj de tiu loko al la plej norda parto de Danlando.

En la sveda gazeto "Göteborgs Posten" aperis artikolo kun foto pri la Kongreso.

La organiza kongres-komitato tre sukcesis en akcepto kaj zorgo pri la kongresanoj kaj kreis tre varman etoson.

Ester Haroun

Antoni Słonimski

#### AL GERMANOJ

Kiam sirakuzanojn konkeris cezaro,  
Gojante fierege pro venkitoj-sorto,  
Kun sanga, kurta glavo el malplena korto  
Arkimedon hejmon eniris barbaro.  
Flarante sangan murdon, kapabla al krimo,  
Antaŭ saĝulo staris, sed lia viktimo  
"Noli turbare circulos meos!" -ekflustris  
Kaj novan teoremon sur sabl'illustris.  
Rugiĝas sango varma, viva kaj malhela  
Sur triangulo, rondo, sekant' akurata...  
Arkimedo, kontraŭ sbiro vin defendu,  
Arkimedo, hodiaŭ mortigata!  
Sablo ensorbis sangan, sed vivas spirito!  
Mensogo! Ĝi pereas! Kie restas spuroj?  
Nune en via hejmo nestiĝas vipuroj  
Kaj pri Helaso restis nur fabela mito.

El la pola tradukis Irena Missiuro

#### RIMARKOJ

Pri la proverbo, la poeto kaj la tradukintino.

La proverbo estas atribuita al la fama helena fizikisto-matematikisto Arkimedo (287-212 antaŭ la erao). En sia verko "Facta et dicta memorabilia" rakontas Valerius Maximus (I-a j.c.), ke Arkimedo vivis en la urbo Sirakuzo en Sicilio. Kiam la romianoj militkonkeris la urbon (212 a.K.), la armeestro Marcelus ordonis ne kaŭzi malbonon al la fama saĝulo. Kiam la legionanoj komencis disrabi la urbanojn, enpenetris unu el ili en la korton de la sciencisto, kiu desegnis geometriajn figurojn sursable. La armeano demandis lin pri lia nomo. Sed la saĝulo, enprofundiĝinta je siaj esploroj, respondis sole per vortoj: "Noli turbare circulos meos!" - ne misordigu miajn cirklojn!... La sangavida romiano glavbatis kaj mortigis la scienciston.

Tiun ĉi rakonton ripetas la postaj historiistoj, Titus Livius (59-17 a.K.) kaj Plutarko (46-120 p.K.).

Antaŭ la eksplodo de la lasta mondmilito, la fama pola poeto Antoni Słonimski, verkis la verson "Al Germanoj", adresinte ĝin kontraŭ la murdintoj de judaj sciencistoj, ĉar tiuj ne apartenas al la aria raso.

A. Słonimski estis tuj post la naskiĝo (1895) kristanigita fare de sia juda patro, cele liberigi la knabon de eblaj suferoj kaŭze de aparteno al la juda nacio. Kaj tion faris la patro, malgraŭ tio, ke li estis filo de Haim-Zelig Słonimski, la fama hebrea verkisto kaj sciencisto, la fondinto de la gazeto "Hacefira",

en Varsovio.

A. Słonimski, kune kun Julian Tuwim (ankaŭ Judo), estis la plej gravaj polaj poetoj kaj felietonistoj de la nuna jarcento. (Julian Tuwim, interalie, estas ankaŭ esperantlingva poeto). Słonimski per plume kuraĝe batalis kontraŭ ĉiaj reakciaj ideologioj, estinte flama adepto de la ideoj liberalismaj kaj socialismaj. Lia liro estas skeptika, ironie satira, tre pikema, sed malgaja.

En la jaro 1939 li sukcesis fuĝi Londonon. Multe vojaĝinte, li vizitis tiaman Palestinon kaj multe miris pri nia nacia renesanco. Tiam li travivis enaniman duonŝiron inter du patrioj. En lia verskolekto "Droga na Wschód", 1924 ("La Vojo Orienten"), li priploris sian bedaŭrindan staton, ĉar "naskiĝis en loko ne deziranta min akcepti..." En multaj versaĵoj li esprimis sian enkoran simpatian rilato al la juda nacio, al ties specifaj urbetoj (en "Elegja miasteczek żydowskich" - Elegio pri la judaj urbetoj) kaj rilate al Israelo. Ankaŭ li verkis kaj versis pri sia patro, pri la avo kaj eĉ pri Avraham Jair-Stern (en "Wspomnienia Warszawskie"-Varsoviaj memoraĵoj, 1957).

La tradukistino de la versaĵo "Al Germanoj", la s-ino Irena Missiuro, estas tre laŭdinda kaj interesplena persono. Estas ŝi pedagogino alte ŝatata de siaj iamaj edukitoj. Altspirita idealistino kaj tre sindonema esperantistino, ŝi per sia vivmaniero praktike efektivas siajn idealojn. Nepretendema virino, tre humila rilate al suferoj, ŝi estas tre modesta kaj tre religiema. Bedaŭrinde ŝi multe suferas dum la lastaj jaroj, kaŭze de malfeliĉa akcidento kaj pro la izola soleco. Bonan agon farus la legonto, kiu surpronus sur sin la taskon distri ŝin per samideanea saluto, ne pretendante pri la respondo. Sia adreso estas: S-ino Irena Missiuro, 10950-Olsztyn-I. Skr. 3. Polska.

J. K.C.



Ĉi tiu numero aperas malfrue pro la foresto de parto de la redakta komitato dum la UK. Pro tio tiu numero estas iomete pli granda ol kutime.

o o o o o

## LA MINORITATOJ EN MEZORIENTO

La intercivitana milito en Libano, kiu kaŭzis kvardek kvin mil da mortigitoj kaj 135.000 da vunditoj, speguligas la sorton de la nemahometanaj minoritatoj en la mezoriento.

Antaŭ niaj okuloj estis ekstermitaj gravaj etnaj komunumoj: Asirianoj, Samaritanoj, Aluoj, Metuoloj kaj aliaj. La procezo de ekstermado daŭras ĉe Kurdoj, Maronitoj kaj Koptoj. La sola kaŭzo de tiu terura proceso estas strebado de la araba imperiismo superregi per araba Ŝtato de la Persa Golfo ĝis la Atlantika Oceano, de la Taurus montoj ĝis ekvatoro en Afriko. Tiu ĉi grandega maŝino, lubrikata per petrodolaroj kaj saturita per armiloj de oriento kaj okcidento, en estonteco devas servi konservativan islaman principon: Araboj ne povas kunekzisti kun fremda "planto" kaj ĉio, kio ne baziĝas je Islamo, devas esti elŝirita kaj elradikigita, ĉar la leĝo de Mahometo estas "per glavo".

La rilatoj de la araba imperialismo kun la minoritatoj neniam ŝanĝiĝis. Malmultaj jam memoras, kio okazis kun Asirianoj amase murditaj per Irakanoj en la jaro 1933. Neniu en la mondo volis savi ilin kaj ilia krio al la "kultura mondo" restis sen eĉo.

Tiu ĉi tragika okazintaĵo donis al la prezidanto de la cionista organizaĵo prof. Haim Weizman bonan instruon (1936): "La Araboj havis nenian kaŭzon timi tridek mil kristanojn en Irako. 30.000 Asirianoj ne estis tie fremdaj, ne estis eŭropanoj, sed lokaj kamparanoj parolantaj la araban lingvon, kiuj asimiliĝis inter milionoj da Araboj... Ŝajnas al mi, ke sperto kiun havis la mondo kun tiu malgranda minoritato malpermesas al ni resti minoritato en Israellando. Tiun starpunkton ni ne forlasos."

La procezo de malapero de Samaritanoj daŭris pli longe. Dum la araba okupado estis 135.000 da Samaritanoj kaj restis nur unu milo. La komunumo de Koptoj, kiu nombras tri milionojn estas la plej kultura kaj inteligentanca tavolo de la loĝantaro en Egiptio. Ilia influo je la evoluo de Egiptio estas tre granda. Malgraŭ tio Egiptanoj strebas asimili ilin kun la araba loĝantaro per la politikaj kaj ekonomiaj rimedoj. La Kurdoj preterlasis okazon atingi sendependecon en la jaro 1920, kaj de tiam ili ribelas kaj estas viktimoj senĉese amase murdataj de Irakanoj. Lastatempe ili estis oferitaj sur la altaro de pakto inter Irano kaj Irako. La okcidenta mondo restis pasiva je la krioj de subigitoj.

La tragedio de la Maronitoj en Libano estas antaŭvidita. Tiu ĉi komunumo turnis sin en la jaro 1946 al la anglo-amerika komisiono pri Israellando kun peticio. Laŭ ĝi "la Kristanoj ne povas ekzisti en la mezoriento sen fondaĵo de la forta Israela Ŝtato, kiu estas viva neceso por ĉiuj minoritatoj subigitaj de la Islamanoj kaj speciale ĝi

rilatas la Kristanojn en Libano. Al la Libananoj la liber-  
eco estas kiel la vivo, sed en la teokrata islama ŝtato la  
religiaj leĝoj katenas la vivon de la homoj kaj ne povas  
esti espero, ke la Islamanoj ŝanĝigos kaj sekularigos  
siajn ŝtatojn. La sola solvo estas nur krei ŝtatojn de la  
minoritatoj, kiel la nacian judan hejmon en Israellando-la  
kristanan nacian hejmon en Libano. Nur se koncentriĝos unu  
miliono da Kristanoj de Libano kaj Sirio en unu libera ŝtato  
kun garantio internacia apud la Juda Ŝtato - nur tiam povos  
la minoritatoj en la araba mondo vivi libere kaj en amikaj  
rilatoj kun la Islamaj nacioj".

La konkludo: por eviti ekstermon kaj persekutadon:  
Minoritatoj de Mezoriento -unuiĝu!

J.N.

#### LA ELEGIO JITGADAL

-KADIŜO-

de József Méliusz

JITGADAL - laŭ alia prononcado JISGADAL - estas la unua  
vorto de la hebrea funebra preĝo - "KADIŜO". Ĝin preĝdiras  
trifoje tage la funebranta filo ekde la mortotago dum  
dek du monatoj, samkiel dum ĉiuj datrevenoj de la morto.  
Se post la mortinto ne restis vira ido, proksima amiko po-  
vas preĝi la Kadiŝon. En la elegio JITGADAL, la unua kaj  
la lastaj frazoj estas en la hebrea lingvo (La aliaj-en  
la aramea).

(La verko Kaddish Poems /Kadiŝ-poemoj/ de  
Allen Ginsberg aperis en 1960 en USONO. La Usona poeto,  
apartenanta al la "beat"-tendenco, skribis ĉi tiun libron  
je la memoro de sia patrino).

Ne Allen Ginsberg,  
ne la potenca kaj venĝema Dio  
kaj ne Lia kvinmiljara popolo  
sed vi, necirkumcidituloj, aŭskultu mian kadiŝon  
ĉi tie  
en Eŭropo -  
mi la necirkumciditulo  
la infano de la antaŭ miljaro baptitaj infanoj  
antaŭ viaj okuloj mi lasas kreski funebre mian barbon  
kaj antaŭ viaj okuloj mi funebre enŝiras mian veston-  
mi la malespera ido de la tuta homa raso  
kun nigra ĉapelo surkape en la societo de naŭ viroj kun  
nigraj ĉapeloj, kiuj estas mortpafitaj je nuko-ni preĝas  
la kadiŝon, ke vi ĉiuj aŭdu ĝin  
ĉi tie  
en Eŭropo

kaj mi kaŝas ne miajn de la sango ne makulitajn man-  
platojn.  
miajn okulojn inflamitajn, vidante la mensogojn de la  
jarcento  
en miajn ambaŭ manplatojn ni entombigas mian maljunan  
vizaĝon de honto flamantan  
kaj mi ekveas:  
-JITGADAL...  
kaj denove ekveas:  
-JITGADAL VEJITKADAŜ...  
ke mia funebrokrinio memorigu vin necirkumciditulojn  
en Eŭropo  
rememoru  
- JITGADAL...

#### II.

memoru,  
ke estas ĉirkaŭ ni kaj inter ni nekalkuleblaj senpe-  
kuloj

kiuj la kulpon ne sciis  
kaj prisilentis la pekulojn  
same la kunulojn de la kulpuloj

kaj kiam ili devis konfesi - silentis kiel roko  
kiel la akvo aŭ la cindro -  
silentis kaj mutiĝis  
sed ili ne estas akuzeblaj per la glorigo de la kulpo  
kaj la pekuloj  
kaj ili vivas en paco  
ĉar la neelportebla pezo de la peko ne premas la lado-  
muron de sia propra konscienco  
kvankam ili mutiĝis  
kaj silentis  
kaj silentas  
kaj tiele ili helpis kaŝigi la pekon  
kaj la kulpulojn  
kaj la komplicojn de la kulpuloj  
kaj ebligis la reviviĝon de la peko kaj pekulo kaj  
komplico -  
ili ja nur mutiĝis  
kaj silentis  
kaj silentas  
kaj estas senkulpuloj  
-JITGADAL ...

Tradukis: Ernesto Schlesinger  
(Rumanio)



IMPRESOJ DE VIZITO EN USONO

USONO estis ĉiam la lando de frapaj kontrastoj kaj en niaj tagoj ĝi restis sama. Kaj unu aspekto de la kontrasto ne influas la duan aspekton.

Post foresto de kvar jaroj mi trovis dum mia lastatempa vizito tie, ke la nigruloj ludas multe pli grandan rolon en la usona vivo. Oni vidas ilin ĉie: en la komerco, en la politiko, en la televido kaj en la artoj. Tamen samtempe la laborsituacio ĉe ili estas tre ne firma. En Novjorko, ekzemple, 40% de la nigraj junuloj estas senlaboraj.

Oni trovas la saman paradokson en la ĝenerala ekonomia vivo. Usono estas tre riĉa kaj la popolo elspezas multe da mono, sed troviĝas ankoraŭ preskaŭ sep milionoj da senlaboruloj. Multaj studentoj de la amerika vivo rimarkis ke kun tiuj kondiĉoj estas tre strange ke la popolo ne ribelas, ke oni ne havas tumultojn en la stratoj.

La ega disvastiĝo de la nigra partopreno en la granda fluo de la usona vivo montras sin plej elstare en la televido. Antaŭ kvar jaroj la nigruloj forestis preskaŭ tute en la televido. Nun oni vidas ilin ĉie en tiu komunikilo: disaŭdigistoj de la novaĵoj, kiel gvidantoj de diskutprogramoj kaj precipe kiel partoprenantoj en la reklamprogrametoj. Ekzistas ankoraŭ pluraj seriprogramoj de komedioj, kiuj estas disvastigataj tra la tuta lando, kiuj havas nigrulojn en la ĉefaj roloj.

Sed samtempe la nigraj "gettoj" en la grandaj urboj estas ankoraŭ amasplenigitaj de milionoj da homoj, kiuj ne povas taŭgi en la moderna socio: homoj kiuj suferas de malbona loĝejo, malbona edukado, malalta enspezo, disrompita familio, drogmanio kaj krimo.

Ŝajnas, ke la sola afero, kiu preventas la eksplodon ĉe tiuj homoj, estas la mondonoj de la registaro kun tre malavara mano. Nigra virino kun pluraj infanoj kaj kiu ne ne havas edzon en la domo por subteni ilin, trovas ofte, ke pli valoras resti hejme kaj akcepti la monon de la registaro ol serĉi laboron.

Tiu sama registara malavaro sendube estas la kaŭzo pro kiu la senlaboruloj ne ribelas. Pluraj junaj senlaboruloj rakontis al mi, ke ili ricevas de la registaro 400 ĝis 600 dol. dum monato kaj per tiu mono ili povas vivi.

Ke la usonanoj estas riĉaj kaj malŝparemaj oni scias jam delonge. Dum mia lastatempa vizito frapis min, kiel ofte amerikanoj manĝas en restoracio. La virino revenas hejmen malfrue vespere kaj oni ne havas sufiĉe da tempo por prepari manĝon. Nu, do la solvo estas kompreneble tre simpla: "Ni manĝu ekstere en restoracio." En la plejmulto

de aliaj landoj manĝo en restoracio estas afero, kiun oni ĝenerale rezervas por specialaj okazoj. Tio do, ŝajnas esti unu el la popularaj distraĵoj ĉe la burĝaj amerikanoj, serĉi novajn kaj interesajn restoraciojn. Kaj multaj de ili estas ekster la urboj kaj antaŭ tri jaroj pro la minaco de manko da benzino kaj la granda plialtiĝo de ĝia prezo oni supozis, ke tiuj restoracioj suferos. Sed ne. La amerikanoj veturas ĝuste kiel antaŭe. "La energia krizo? Nu, oni trovos la solvon iamaniere".

Estas du aliaj elspezoj, kiuj elstaras lastatempe. La unua estas tapiŝoj kaj la dua-domplantoj.

Tapiŝoj-ĝenerale de unu muro ĝis la dua estas uzataj en salonoj, en litĉambroj kaj sur la ŝtuparoj. Lastatempe ili metas ilin ankoraŭ en la necesejon kaj en la banĉambro. Oni supozas, ke ili ne estas tre praktikaj en tiuj lastaj du ĉambroj, sed usonanoj insistas havi ilin tie. La sola ĉambro, kiu ne havas tapiŝojn ankoraŭ estas la kuirejo.

Domplantoj ankoraŭ estas metataj en ĉiu ĉambro, kie estas eble, ĉie kie estas iom da lumo -ankoraŭ en necesejo kaj en la banĉambro; eĉ la kuirejo por la domplantoj ne estas escepto. La komerco de la domplantoj prosperegas. Apud multaj manĝaĵmerkatoj vi vidas nun tre ofte grandan specialan sekcion por la vendo de plantoj.

Vatergajt (Watergate) kaj la vjetnama milito estis en Usono okazoj por cerblavado kaj anim-ekzameno. Nun estas tie alia fenomeno. El nacio eliris Jimmy Carter kaj fariĝis unu de la plej popularaj homoj en Usono; kaj neniu homo, kun kiu mi parolis, ŝajnas al mi, havas klarigon kiel tiu viro sukcesis fari tion, kion li faris. Oni bezonas tre atenteman ekzamenon de la amerika menso por trovi en la ĵus-pasintaj jaroj kontentigan respondon, kiel tiu nekonata homo povis esti gvidanto de 220 da milionoj en Ameriko. Kiaj ajn estis la kialoj de lia subita apero, oni povas esti certa, ke estos tre interesa travivaĵo rigardi, kiel tiu nova ne sperta homo (sendube li estos elektita) penas solvi la malfacilaĵojn de nacio kun grandaj problemoj de malriĉeco en mezo de vasta riĉeco, kun sociaj kaj ekologiaj problemoj, kiuj ne kalmiĝas, kun la problemoj de trankvilo enlande meze en la mondo kun eksplodemaj danĝeroj.

R. Alberg

Rabbi Jehuda (Ben Ŝemuel)  
ha-Levi; Toledo, 1080-(?),  
1142. Filozofo kaj teologo.  
La plej grava hebrea poeto  
dum mezepoko. \*

### OMAĜE AL JERUSALEMO

( " יְהוּדָה בֶּן-שִׁמְעוֹן , מְשׁוּשׁ תְּבֵלַל... " )

Pejzaĝ`de bel`, vi monda rav`,  
Ho, urb`de reĝa grando:  
Al vi sopiras mi sen sav`  
De l`okcidenta rando.

Kaj memorigas kun dolor`  
La kor` kun ploro ĝema,  
Pri forpasinta via glor`,  
Ruin` Jerusalema.

Se prenis al Sankter` min tuj  
Flug` agla per magio,  
Mi lavus ŝtonojn de patruj`  
Per larm` de nostalgio.

Ĉar kie floris roz`, levand`,  
Kaj vivis reĝoj piaj,-  
Dezert` nun estas, dorna land`,  
Serpentoj kun skorpioj.

Mi falus teren sur genu`  
Forplorus la okulojn,  
Kaj kiskus pro la korenu`  
La dolĉajn terobulojn ! ...

Tradukis: J. Kohen-Cedek

La silabkalkulan metrikon de la originalo la  
tradukinto anstataŭigis per jambo.

\* "Laŭ popollegendo, mortigita de krucmilitista  
kavaliro, apud la Lamenta Muro de Jerusalemo,  
tuj kiam li ĝin atingis la unuan fojon.

### Angulo de JELI

#### Ne forgesibla IJK en Tesaloniko

La 32-an Internacian Junularan Kongreson okazintan  
en Tesaloniko, Grekio, de la 24-a ĝis la 31-a de Julio,  
partoprenis 380 personoj el 26 landoj. La plej granda  
grupo estis la jugoslava - pli ol 100 partoprenantoj.  
De Israelo venis 22 esperantistoj. Atinginte Tesalonikon  
estis agrable renkonti esperantistajn gejunulojn, kiuj  
atendis nin en la stacidomo. Kune ni veturis al la stu-  
denta domo, kie okazis la kongreso kaj kie ni loĝis. Nur  
la pluvo dum nia vagado kun la valizoj tra la nekonataj  
stratoj de la urbo ne plaĉis al ni...

Ĉiu kongresano ricevis apartan komfortan ĉambron.  
Estis disigo inter viroj kaj virinoj kaj oni strikte  
kontrolis, ke uloj ne enŝteliĝu en la inan domon.

Dum la unua vespero, same kiel en la aliaj, estis inte-  
resa programo. Ĝi enhavis la interkonan vesperon. Ĉiuj  
babilis kaj provis ekkoni multajn geamikojn. Tio estis  
nur la komenco de la interesaj kaj agrablaj interkonati-  
ĝoj kaj konversacioj.

Dimanĉe matene okazis la inaŭguro kaj la akcepto de  
la ŝtataj kaj urbaj aŭtoritatuloj. Vespere kelkaj grupoj  
prezentis grekajn popoldancojn. Tiuj, kiuj konas niajn  
popoldancojn povas aserti, ke estas simileco inter ili.

Kelkaj laborgrupoj, kiuj havis diversajn temojn,  
komencis funkcii lunde. Estis tri laborgrupoj: 1) "Kompu-  
tero kaj Programado" - Amri Wandel (Israelo); 2) "Kiel  
vigligi la intereson al Esperanto ĉe la junaj homoj?" -  
Angel Todorov (Bulgario); 3) Esperanto-kursoj por komen-  
cantoj kaj progresantoj - Jim Cushing (USONO). Krom la  
laborgrupoj estis ankaŭ kelkaj interesaj prelegoj.

Lunde okazis la Internacia Vespere, kiu estis la  
plej interesa vespero de la kongreso. Ĝi komenciĝis per  
brita popolkantado kaj dancado, prezentitaj de britaj ge-  
junuloj. Poste s-ano Kohen-Cedek de Israelo deklamis tri  
poemojn. Nelly, nia svisa amikino, kantis svisgermanajn  
kantojn, kio estis eble la plej sukcesa ero; estis anko-  
raŭ multaj interesaj kaj ridigaj programeroj de Italio,  
Jugoslavio, Novzelando kaj aliaj. En la fino aperis deno-  
ve israela kvarteto: Gila, Amri, Eti kaj Ejal, per piano  
akompanataj de s-ano Kohen-Cedek. Ni kantis kanton de  
Ejalik kaj poste "Bonvenu Paco sur vi" kaj "Ho kiel bone  
agrabla" - la aŭdantaro aliĝis. Ni kvar portis la blu-bla-  
nkajn ĉapojn, kiel la tuta israela grupo, kaj en la fino  
ni jetis ilin supren.

Merkrede veturis ĉiuj kongresanoj al Halkidiki. Ni

bele pasigis la tempon ĉe la marbordo, guante la sunon kaj la bluan maron. Jaŭde vespere okazis belega gitarkoncerto. Dum la paŭzo estis israela surprizo. Ni preparis israelajn tipajn manĝaĵojn - Falaflo kaj Humus; ĝi ege plaĉis al ĉiuj kaj tuj elĉerpiĝis!

Krom la oficiala programo estis multaj travivaĵoj, kiel komunaj ĝuoj de la tempo ĝis noktomezo, konversacioj, kantado, dancado, nokta naĝado ktp. Tio kontribuis al la speciala etoso de la junulara kongreso.

Resume, tio estis la unua fojo, kiam la israela partopreno en IJK estis tiom amplekse aranĝita kaj signifa. Nia grupo, kvankam tre varia rilate la aĝojn, estis unuiĝinta kaj ĉiam vigla. Estis neforgesebla travivaĵo por ĉiuj kaj speciale por niaj gejunuloj, kiuj la unuan fojon partoprenis Jun.Kongreson.

Gila Graf kaj Eti Kremer



#### EUROPA ESPERANTO-KONGRESO

En la jaro 1977 la Universala Kongreso okazos en Rejkjaviko, Islando, ekster la eŭropa kontinento. Pro tio la 27-31-an de Majo estos organizata Eŭropa Esperanto-Kongreso en la urbo Paderborn. Paderborn estas konata kiel la plej esperantistigita urbo en Germanio kaj eble en la tuta Eŭropo. La kotizo ĝis la fino 1976 -21 germ.markojn. Kelkaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe d-ro Maŝler. Adreso de IJK: d-ro Hans Kassermann, Falkenweg 10, D-4790 Paderborn, FRG-Germanio.

#### PLIBONIGO DE ERARO

En la antaŭ nelonge eldonita broŝuro "N.B. Havkin" (Ekzemplo de homa vivo), de J. Kohen-Cedek, pro teknikaj kaŭzoj ne aperis sur la titolpaĝo la nomo de la eldonejo ELI kaj la nomo de la mecenato, donacinta la eldonelspezojn, - s-ro A. Holzhaus, Columbus, Indiana, USONO. Tiun ĉi mankon ni laste plibonigis, surgluante konvenloke la koncernan mencian. La dezirantoj akiri tiun libron (je la kosto de 3 liroj plus unu liro-poŝtelspezoj; por eksterlandanoj: 2 respondkuponoj) bonvolu sin turni al s-ano J. Giladi, Kfar Saba, str. Ĉerniĥovski 94, aŭ ricevi persone en la klubo.

#### NOVA TURISTA INFORMILO

La malnova turista informilo "Ekkonu Israelon 1971" elĉerpiĝis en la komenco de la jaro. Antaŭ ne longe estis eldonita nova turista informilo pli ampleksa, kun pli detalaj informoj pri turistaj objektoj en Israelo, 2-paĝa kun bela titolpaĝo; ĝi enhavas ankaŭ 5 fotografajojn de la israelaj vidindaĵoj. Ĝi estas prilaborita de H. Maŝler; redaktis ĝin A. Manor. La titolpaĝon pretigis R. Anŝel. La broŝuro povas esti eluzata kiel donaco al eksterlandaj geamikoj. Ricevebla en kluboj - simbola prezo: unu IL, - aŭ per poŝto (sendu ĉe d-ro H. Maŝler, T-A. Hapardes 11); kun poŝtelspezoj-2 IL.

#### EL LA ESPERANTA GAZETARO

Okaze de 75-jara jubileo de Prof. G. Waringhien aperis en "Horizonto" tre interesa artikolo de N.Z. Maimon. La artikolo pritraktas tre interesan sintenon de la jubileanto rilate la judan religion.

Prof. W. naskiĝis en katolika familio, sed post jaroj forĵetis sian religian kredon. Inter multaj verkoj, al kiuj apartenas la laboro de lia vivo Ple-na Ilustrita Vortaro, estas 22 aliaj liaj verkoj. Interesaj estas liaj eseoj pri arto kaj religio. La lastaj tuŝas tre profunde nian religion. La artikolo estas leginda, sed ni ĉi tie donos nur kelkajn ekzemplojn por illustri lian sintenon je nia religio:

"Jesuo estis kondamnita de la Roma Prokuratoro, kiel mesiista agitanto; li estis ekzekutita de romaj soldatoj kaj per specife romana turmento, la kruco, rezervita al sklavoj kaj ne Romanoj - kaj tamen, ĝis la Dua Vatikana Koncilio la tuta kristanaro tenis la Judojn kolektive respondecaj pri lia morto".

"Kiam mi tra legis la libron pri Dreyfus, mi konsciis, ke ekster la religia aspekto ekzistas unu aparta problemo de la juda gento".

"La tuta eŭropa civilizo baziĝas sur la tri mirakloj - hebrea, helena kaj romana, sur heredaĵoj de tiuj tri popoloj, kiuj donis al la homaro ĝian religion, ĝian sciencan kaj ĝian juron... mi elektis ekoni la judismon en ĝia vera kaj origina formo, ne en ĝia kristana katolika degenero". N.Z. Maimon sendas al Li korajn salutojn. Ni-ELI, JELI kaj IE ankaŭ de nia flanko deziras al li multajn jarojn da sano kaj forto por daŭre labori por nia komuna celo.

Ni tre bedaŭras, ke en nia malampleksaj kadroj ni ne scipovas represi la tutan artikolon, sed rekomendas al ĉiuj, kiuj scipovas, ĝin trastudi en originalo, aŭ eĉ pli bone en liaj Eseoj.

Dum la lastaj jaroj en Sennaciulo aperis serio de kontraŭisraelaj artikoloj, de kiuj kelkaj distingis sin per nazia antisemitismo. Ne nur la konkludoj estis pretigitaj laŭ la kutima soveta modelo, sed ankaŭ faktoj estis ĉerpitaj de Soveta gazetaro. La respondoj de israelanoj estis tranĉitaj de ĉiuj flankoj kaj ne povis doni rebaton al niaj malamikoj.

La supron de tiuj atakoj atingis tamen ne Sennaciulo sed "La Juna Penso", kiu sub formo de traduko de konata israela komunisto prof. Šaĥak akuzas Israelon pri la krimoj, kiujn ĝi kvazaŭ faris, ĉar la pruvo estas, ke la artikolon skribis Judo. Mi ne volas memori al la samideanoj de la orienta mondo, ke en demokratia lando oni ĉion povas skribi, eĉ se ĝi estas mensogo kaj eĉ, se por la skribaĵo oni ricevas monon de niaj malamikoj. Kvislingoj estis ĉie kaj ĉiam. Sed tion la aŭtoroj ne komprenos, ĉar ili havas malfermitan buŝon nur kontraŭ Israelo.

Sed fine ni devas konstati, ke en la lasta numero de Sennaciulo aperis unuan fojon forta artikolo, kiu sciopovis rebati la antaŭajn mensogojn: La longa bela artikolo de David Davidoviĉ. Tiu artikolo tiel kontrastas antaŭajn, ke ni volas kredi, ke ĝi ne estos la sola signo de estonta ŝanĝo en la redakcio de Sennaciulo.

H.M.

#### De la esperanta gazetaro

En "l'omnibuso" (Japanio), n-ro 1 kaj 2 (Januaro-Marto 1976), aperis granda, dividita en du partojn interesa kaj grava artikolo "Personaj nomoj de zamenhofa familiano" de s-ano J. Kohen Cedek.

En la sama revuo aperis du poemoj de la konata en Israelo novjorka poeto Julius Balbin. Unu estas traduko de Bertold Breĥt; la dua - "Rememore" - originala. Ambaŭ estas interesaj kaj legindaj.

o o o o

#### EL LA ISRAELA GAZETARO

En la gazeto DAVAR aperis longa kaj interesa artikolo pri s-ano Lövenkopf. La artikolo pritraktas lian vivon kaj lian rilaton al Esperanto.

En Maariv aperis longa letero de Amri Wandel pri la UK kaj IJK. La letero mencias la telegramajn salutvortojn de nia Statprezidento E. Kacir kaj la esperantan saluton de nia diplomato, kiu elvokis laŭtan aplaudon de la kongresanoj.

o o o o

#### KUN GRANDA MALĜOJO

Ni sciigas pri la forpaso de nia multjara, sindonema s-ano DAVID TACHAUER.

David Tachauer, profesoro de matematiko, enmigris Israelon en la jaro 1910. Li dediĉis sian vivon al la plej elstaraj idealoj: al kibuca vivo kaj al Esperanto. Li estis multjara Delegito de UEA en Gyaram. Li ĝisvivis profundan maljunecon laborante preskaŭ ĝis la lastaj monatoj en la kibuco. Li organizis la tutan poŝtan laboron de la kibuco kaj kunlaboris kun la Israela Meteologia Instituto.

o o o o

Nia neforgesebla samideano D. Taĥauer postlasis por ELI ĉiujn siajn esperantaĵojn. Ĝi estas vera trezoro de multvaloraj libroj. La biblioteko jam troviĝas en la manoj de ELI.

o o o o

#### NI FUNEBRAS

Pri la morto de DINA ELJAŠIV (dumviva membro de ELI)  
IZIDOR STEINFELD (dumviva membro de ELI)  
JOĤANAN TIROLLER

#### KONDOLENCOJ

ELI kondolencas niajn gesamideanojn Natalia kaj Nisim Israeli pro la morto de Ilia filo.

PRI NIA KLUBVIVO

En la pasinta sezono, en nia klubejo ĉe Ŝimon Hatarsi strato 6, estis ĉiu-jaŭde kunvenoj laŭplane antaŭaranĝitaj je diversaj temoj (rakontoj, diskutoj, prelegoj, filmo kaj lumbildoj).

Ĉiuj vesperoj estis sufiĉe interesaj. La nombro de la partoprenantoj variis inter 20-40. La Landan Konferencon partoprenis ĉ.100 Esperantistoj.

Vizitis la klubejon multaj eksterlandaj gastoj, kiuj salutis aŭ prelegis. Ĉiuj impresiĝis pri la bona atmosfero reganta inter la israelaj samideanoj kaj pri 100 % reganta esperanto en la klubejo.

En Aŭgusto nia klubejo, pro la fermo de la domo ĉe Ŝimon Hatarsi, translokiĝis al la lokalo de "Brit Hariŝonim" ĉe la strato Naĥmani 26 (La lokalon ricevis per sia propra influo prez. A. Manor). La 16.9 ni revenas al la malnova loko.

PRELEGOJ EN LA KLUBEJO

E. Haroun:	Konversacia vespero
K. Perlman:	La plej gravaj eventoj en la jaro 1975 (dua parto)
A. Manor:	Trarigardo de esp. gazetaro
H. Maŝler:	Necenzuritaj humoraĵoj
J. Feĥter:	Ŝamaismo, "pro domo sua"
J. Ben Alter:	La juda kanto dum generacioj (fino).
I. Beĥar:	Josefina Baker
M. Winograd:	Filmo pri Grekio
E. Haroun:	Konversacia vespero
A. Manor:	Kolomano Kalocsaj
K. Perlman:	Gravaj eventoj en la jaro 1975 (tria parto)
N. Drezner:	Konversacia vespero
A. Wandel:	Kongreso de TEJO (raporto)
M. Ben Porat:	Internacia labortendaro en Gaaton
E. Haroun:	SAT-Kongreso en Rotemburgo
J. Giladi:	UK en Ateno
J. Semer:	" " "
N. Drezner:	Konversacia vespero
H. Maŝler:	Kiel venkos esperanto?
J. Giladi:	Miaj gekorespondantoj (dua parto).



VENONTAJ PRELEGOJ EN LA KLUBEJO

16.9.76.	Scholz	Lumbildoj (gasto de Germanio).
23.9.76.	Drezner	Interparolado (Feriaj travivaĵoj)
30.9.76.	Manor	Cu ekzistas esperanta kulturo?
7.10.76.	Murĵan	Ni traduku hebrean kanton en esp.
14.10.76.	Haroun E.	Lumbildoj pri SAT kongreso kaj Skandinavio
21.10.76.		Interparolado de ELI kaj JELI
28.10.76	Ben Alter	Prelego (la temo sciigota)
4.11.76	Ben Porat	Filmo

Povas esti ŝanĝoj en la programo. La gastoj de eksterlando havas rajton ĉiam anstataŭigi israelajn prelegantojn.

o o o o



NOVAJ (MALNOVAJ) KURSOJ

La 27-an de Okt. komenciĝas, kiel kutime, la kurso en la Junulara Domo en Tel Avivo. Ni petas informi pri ĉiuj, kiuj estas interesitaj pri nia lingvo al d-ro Maŝler, T-A, str. Hapardes 11.

La koresponda kurso daŭras. Ekstertelavivanoj povas enskribiĝi skribante poŝtkarton al "Esperanto-Koresponda Kurso", T-A, p.k. 22041 (Kursgvidanto-J. Semer).

o o o o

KOTIZO

Pagu la kotizon per la aldonita ĉeko. En la jaro 1976 la kotizo estas 30 IL.

o o o o

## NIAJ GASTOJ

Pentti Turtola	Finnlando
D-ro Nelly Karl	USONO
Eduard Kalmar kaj edzino	USONO
Hetta Kesälä	Finnlando
Baca Eugenia kaj filino	Meksiko
Gigi Harabagiu	USONO
Petrin Natalia	Rumanio
Frank Lilleike	Germanio
Eino Kilku	Finnlando
Gefratoj Skolnik	Argentino

## DONACOJ

D-ro Beñar Jaakov	80 IL.	(aldono por la kovrilo de IE )
Brigitte Semmler	29.20	(Germanio)
Ragnhild Lonblad	61.36	(Danlando)
Suldenfrei Eduard	81.30	(Svedlando)
Henrik Karlsson	35.20	(Svedlando)
Vaksman Henia	100.00	(Israelo)
Vogel Fajgel	50.00	(pere de d-ro Mašler)
Waldmann Slomo	60.00	(pere de d-ro Mašler)
D-ro A. Vedrine	45.00	(Francio)
Gastao Florencio	41.00	(Kanado)
S-anino Dora Wunderbaum	fariĝis Dumviva Membro	
	de E.L.I.	

## NOVAJ SAMIDEANOJ

Graf Gila  
 Lev Jaakov  
 Meir Gad  
 Meroz Joram  
 Pinkas Lea  
 Reznik Oded  
 Havivi Jael  
 Cur Nili  
 Ben Porat Tamar  
 Bromberg Cipi  
 Manor Ariela  
 Sañar Rona  
 Ofer Meri  
 Rebiš Eran



## JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

peras la internacian korespondadon. Tiu, kiu deziras korespondi kun japanaj esperantistoj, klare kaj preslitere skribu leteron al jena adreso: Japana Esperanto-Instituto, Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokio 113, Japanio. Krom via nomo kaj adreso ne forgesu skribi ankaŭ aĝon, sekson, intereson kaj profesion.

## VOLAS KORESPONDI

Danuta Romańczyk, Warszawa Bielany, Żeromskiego 64/9  
 01-846, Polska (Polio).

Grzegorz Koziara, Narcyzów 7, 42-600, Tarnowskie Góry,  
 Polska (Polio). Interesiĝas pri turismo, bildkartoj,  
 Sankta Tero kaj memorsignoj. 20-jara.

S-ro D. Sabino Pelegrin Colomo, S. Vicente Màrtir  
 24, 4º D. Zaragoza-8, Espana (Hispanio).  
 Kemiisto, 27-jara, lernas ankaŭ fremdlingvojn ĉe  
 universitato. Interesiĝas pri: Internacia lingvo,  
 scienco, religio, muziko, ekskursoj kaj precipe pri  
 judaj aferoj. Volas ekkoni la hebrean lingvon.

S-ro Buta Ion, str. Nuoā Bl.Cl AP.20, Nāsāud 4500,  
 Jud. Bistrita-Nāsāud, R.S. Romanio. 28 jara, ĉefo de  
 stacidomo. Interesiĝas pri bildkartoj, poŝtmarkoj, fo-  
 toj de filmoaktoroj, gramofondiskoj kaj ĉiuj aliaj  
 temoj.

F-ino Jivka Dekova, Car Asen 9, Sofio-C, Bulgario,  
 profesoro de violono en muziklernejo.

S-ino Nicaise, 10 passage Vèdi-St Charles, 78000 Versai-  
 lles, Francio. 58 jara, instruistino, in-  
 struas juron en liceo kaj ekonomion. Ŝatas literaturon,  
 ŝatas legi kaj naĝadi, ateistino.

S-ro Gastao Florencio, 469 Hyman Drive, DOLLARD DES OR-  
 MEAUX, QUEBEC-CANADA. -kun s-ino. Li estas 62-jara.  
 Volas iomete lerni pri Israelo.

La grafikan parton de  
la titolpaĝo pretigis  
nova adeptino de nia  
lingvo s-ino Rut Ansel.